

REGO

☆ **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU

№ 6 (37) decembro 2006

просто еще одна мечта

Если позволить себе помечтать...

- ✓ и представить, что **все люди** на Земле, кроме родного языка знают еще и общий, **международный**
- ✓ и этот язык не принадлежит **ни одной нации**
- ✓ а выучить “как родной” его можно легко и очень быстро
- ✓ и говорить на нем **на равных** со всеми народами Земли...

Всё лучшее на свете сначала было *мечтой*.

ЭСПЕРАНТО
международный язык



en la numero

invito al REK kaj EoLA en Tiĥvin

Renkontiĝo de Amikoj RA-5 apud Bajkal

REU aperigis novajn belaspektajn varbilojn

aperis rusa traduko de “Dek tagoj de kapitano Postnikov”

antaŭ 30 jaroj okazis la unua “Liro”

“Fabelo pri Pluvo” de B.Aĥmadulina en traduko de L.Novikova

“Bulteno de REU”, novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2006

enhavo:

- 01 *Enspirindas aer' de l' muziko...*
- 02 *Renkontiĝo de Amikoj – 5*
- 03 *Rememoroj pri RA-4*
- 04 *N.Neĉajev. Mi iam revenos*
- 05 *Iom da historio*
- 07 *La 11-a LF en Ĉeboksari*
- 08 *REU-Estraro kunvenis en Ĉeboksari*
- 08 *Pli granda membraro en 2006*
- 09 *Malferma tago en nova medio*
- 09 *Ni rememoris pri eksaj membroj*
- 09 *Komenciĝis la elektoj en UEA*
- 10 *REJM restos en REU*
- 10 *Jarlibro-2006 aperis*
- 11 *Novaj belaspektaj varbiloj*
- 12 *Novaj REU-aliaĝoj por 2006*
- 12 *Danko al la REU-subtenantoj*
- 12 *Kotizoj de REU por 2007*
- 13 *La junularo kongresis*
- 14 *Raporteto pri TILE-2*
- 14 *Lingvaj rajtoj en Eŭropo*
- 15 *UEA invitas prelegi en IKU-sesio*
- 16 *La Kongreso en Ukrainio*
- 16 *Trovu laboron per Esperanto kaj Interreto*
- 17 *Deklaro pri komunaj lernolibroj pri historio en Esperanto*
- 17 *Volgograda EK "Espero" festis 30-jariĝon*
- 18 *Iom beletra, iom faka*
- 19 *IKU-libro 2006 en la reto*
- 19 *Belartaj Konkursoj de UEA en 2007*
- 20 *Tradukoj de Lusi Rimon*
- 20 *Poeto-esperantisto fariĝis nova rusa verkisto*
- 22 *Rememoro pri "Liro"-j*
- 25 *Neforgeseblaj "Liro"-j*
- 26 *La rezultoj de "Liro-76"*
- 27 *"Novjara valso" de N.Cvileneva*
- 28 *"Fabelo pri Pluvo" de B.Aĥmadulina*
- 04, 16, 21 *Anekdotoj*
- k3 *Amuzaj misskriboj kaj eraroj*
- k3 *Aperis rusa traduko de E-romano*
- k4 *Bildoj de la novaj varbiloj*



**REGo deziras al ĉiuj feliĉan
Novjaron kaj esperas, ke ni
restos kune ankaŭ en 2007!**

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 6 (37) decembro 2006

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Grišin

*materialoj de REGo povas esti
represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos
senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto*

*poŝta adreso: Pjaticnikoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio*
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2007:

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj
de KŜŜ – 200 rubloj sendendaj al:*
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj
pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA*

😊 AMUZAJ MISSKRIBOJ KAJ ERAROJ 😊

Jen estas kelkaj amuzaj eraroj kaj misskriboj, trovitaj dum legado de diversaj E-tekstoj, plejparte – artikoloj kaj informoj, senditaj por REGO: *antusiasmo* (anst. entuziasmo); *bodeziro* (anst. bondeziro); *etis granda koncerto* (anst. estis); *fotostreĉo* (anst. fortostreĉo); *internlingvistika konferenco* (anst. interlingvistika); *kvar tela* (anst. kartvela); *kuraĉisto* (anst. kuracisto); *mi pidras* (anst. pigras); *prijekto* (anst. projekto); *sekteto* (anst. sekreto); *sintento* (anst. sinteno); *sporhalo* (anst. sporthalo); *surflanke* (anst. surplanke); *trakukita* (anst. tradukita); subskribo de oficiala informo de la Akademio de Esperanto: *La estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la direktoro de la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Bertilo Wennergren.*

APERINTA LIBRO MERITAS APARTAN ATENTON

Михаил Бронштейн. Десять дней капитана Постникова (*Mikaelo Bronŝtejn. Dek tagoj de kapitano Postnikov*). Historia romano tradukita en la rusan. 368 p. “Impeto”, Moskvo. 2007. Tradukis el Esperanto Anatolij Radaev, aŭtore redaktis Mikaelo Bronŝtejn, kovrilpaĝo de Vjaĉeslav Te, ilustraĵoj de Anastasia Baŝlikova. Eldonkvanto 500 ekz.

Dum preparado de la eldono minimume du renomaj en Rusio esperantistoj plenserioze demandis min: “Kiu aĉetos tiun libron en la rusa? Ĉu entute indas tia eldono?”. Eĉ nun, kiam la libro ankoraŭ ne atingis librovendejojn, mi povas respondi: “Jes, tia eldono indas”. Komence kaj ĉefe, mi neniom dubas pri tio, ke la aŭtoro mem kaj la romano meritas okupi indan lokon sur la librobretoj inter ruslingvaj eldonaĵoj. Krome, la kvanto de legantoj en la rusa lingvo, sendube, estas nekompareble pli granda ol tiu de la esperantistaro, do kun la E-aŭtoro povas konatiĝi pli vasta aŭditorio.

Kompreneble, la prezento de E-literaturo por neesperantista publiko supozas apartan singardan elektan laboron por la eldonistoj. Antaŭ dudeko da jaroj unu el komencantaj E-verkistoj al mia demando, kial do li intencas verki en Esperanto sed ne en la rusa lingvo, sincere respondis al mi, ke en Esperanto ne ekzistas tiom streĉa konkurenco inter verkistoj, kaj pro tio atingi ian gradon de rekono estas multe pli facile ol en la rusa. Oponante nun al mia tiam ankoraŭ juna amiko mi volas noti, ke por vera verkisto ne ekzistas lingvaj baroj, kaj la prezentata libro estas por ni eĉ pli valora kaj kara ol ĝia esperantlingva ekvivalento. Pere de “Dek tagoj...” la eldonejo “Impeto” intencas montri kaj daŭre ekspluati la fakton, ke la E-verkistoj, almenaŭ kelkaj el ili, povas sukcese konkurenci kun la ruslingvaj aŭtoroj.

Ankoraŭ unu evento kiu koincidas kun la apero de “Dek tagoj...”: decembre en kelkaj moskvaj vendejoj aperos du libroj en Esperanto: de la fratoj Strugackij “Lundo ekas sabate” en traduko de Mikaelo Bronŝtejn, kaj de Sergej Lukjanenko “La Nokta Patrolo” en traduko de Dmitrij Ŝevĉenko.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)




NOVAJ BELASPEKTAJ VARBILOJ



afiŝo (A3)



faldfolio



afiŝo (A4)

REU eldonis 5 belajn kolorajn varbilojn. Bildojn de kvar el ili vi povas vidi ĉi tie, la kvinan (tio estas la bildkarto) – en la unua kovrilpaĝo de tiu ĉi numero. Pli detale pri la varbiloj bonvolu legi en la paĝo 11.



afiŝo por Lingva Festivalo (A4)